

La Lima-letero de Ljudovik Samenhof el 1902

de Bert Boon

“Jam maloftiĝis la nombro de liaj skribaĵoj, leteroj, poŝtkartoj, per kiuj li konstante gvidis la unuajn paŝojn de la frutempaj pioniroj.” (A. Ribot, 1965)



I Presentado

1. Enkonduko


Tiel André Ribot plendis kaj malŝarĝis sian koron, maltrankvilan pro la konstato, ke postlasitaj skribaĵoj de Zamenhof perdiĝis aŭ malaperis. Kaj ne nur sub la ruinoj de la du mondmilitoj!

Kie ja nuntempe troviĝas la originalaj konservitaj leteroj de Zamenhof? Kie la originalaj leteroj kiujn li ricevis el preskaŭ ĉiuj anguloj de la tiama mondo?

1.1. La Gotha-letero (1909)

Pravis kaj senĉese pravas Ribot, sed ni ne perdu la esperon trovi aŭ malkovri ŝajne perditajn skribaĵojn, ankaŭ ne tiujn senditajn de Ludoviko al tutmondaj pioniroj, kiuj ofte agis en la ombro.

Ekzemple, pro bonŝanco kaj hazardo la 30^{an} de oktobro 2009, okaze de aŭkcio en Victoria BC, en la kanada provinco Brita Kolombio, estis vendita al esperantisto la t.n. “Gotha letero” (1909) de Zamenhof sendita al la germana doktoro - profesoro Carl Rohrbach. En la 41^a jarkolekto de junio 2013, n-ro 245, *Literatura Foiro* aperigis monografion pri tiu ĝis tiam nekonata letero kun originala koverto, sub la titolo “La enigma odiseado de zamenhofa letero” (p.136-146). Tiu “nova” korespondaĵo, neniam antaŭe registrita aŭ presita, fine, post unu jarcento, revenis el Kanado al Eŭropo, post pago de US \$ 370.



1.2. La “Lima- letero” (1902)

Nur dek jarojn poste, la 11^{an} de novembro 2019, okaze de aŭkcio en Limo (Peruo) alia nekonata, neregistrita letero de Zamenhof sur oficiala, rusa poŝtkarto, bonŝance reiris el Sudameriko al Eŭropo post pago de € 105 kaj tiel ĝi iĝis la temo de ĉi-monografio, siavice publikigita en *Literatura Foiro*.

Kiel la Gotha-letero, ankaŭ la Lima-letero neniam estis menciata, nek en la “*Originala Verkaro*” de Dietterle (1929), nek en la “*Aŭtografoj de D-ro L.L. Zamenhof*” de Ribot (1965), nek en la kolekto “*Zamenhof; leteroj*” de Holzhaus (1975), eĉ ne en la plej kompleta kolekto en tri volumoj de la “*Originalaro*” (PVZ), redaktita de Ludovikito (Kioto, 1989-1991). Krome ne en la volumo “*Aŭtografoj de Ludoviko*” (1989), ankaŭ ne en la volumoj “*Spikumajoj*” I, II, III, respektive el 1994, 1995 kaj 2004.

2. Priskribo

2.1. La aktuala stato

Malgraŭ la sufiĉe alta aĝo (1902-2020), la oficiala, cara poŝtkarto estas en tre bona stato. Apenaŭ videblaj estas premmarketoj ĉe la anguloj, verŝajne kaŭze de fiksiloj, kiel pasintece uzitaj en oldaj fotoalbumoj.

Laŭ la kolekto de zamenhofaj korespondaĵoj el la jaro 1902, kompilita de Ludovikito, Zamenhof forsendis en tiu jaro:

- 31 poŝtkartojn
- 17 leterojn
- 3 korespondaĵoj sen mencio de la speco
51 entute

Do, kun la Limo-korespondaĵo, ekde nun:

- 32 poŝtkartojn
- 17 leterojn
- 3 korespondaĵoj sen mencio de la speco
52 entute

2.2. Mezuroj kaj koloroj


mezuroj: 141mm x 89mm

pezo: 2,31g

koloroj: - malhelbruna, maldika kartono muara, kun ruĝaj ilustraĵoj kaj surskriboj. Manskribo per nigra inko.
- ruĝkolora manskribita numero 228

3. Aspekto¹

3.1. Averso




Supre, maldekstre: ruĝkolora bildo de la cara blazono de la gento Romanova (caro Aleksandro 2^a).

Supre, dekstre: ruĝa poŝtmarko de kvar kopekoj kun cirile la vortoj: “poŝta marko”.

3.1.1. Supre, meze: ruĝkoloraj surskriboj en la rusa kaj en la franca².



= “UNIVERSALA POŝTA UNIO RUSIO”



= “POŝTA KARTO”

3.1.2. Meze, sube: per nigra inko manskribita adreso de la adresito:

Al S-ro


Dr. Federico Villareal

en Lima

Peru, America

3.1.3. Maldekstre, sube: ... (?) *Amerika* (manskribita cirile)

3.1.4. Tute sube en la rusa kaj en la franca




= “Spaco rezervata por l’ adreso”

¹Vidu 4.1.

²Vidu.4.2.

³ Vidu 4.3.

3.2. Reverso




3.2.1. Supre, maldekstre: stampita adreso de Zamenhof⁴

Dr. L. Samenhof
Warszawa, ul. Dzikie N° 9



Supre, dekstre: la dato.⁵

10 / XII 02



3.2.2. Maldekstre, meze kaj vertikale:



Ruĝa manskribita, laŭorda numero 228. Villarreal kutimis tiel kronologie ordigi siajn esperantajn korespondaĵojn.

⁴ Vidu 4.4.

⁵ Vidu 4.5.

4. Klarigoj (rilate al la paragrafo 3^a)

4.1. Aspekto kaj tipo de la poŝtkarto

La tipo de la Limo-poŝtkarto ne estis la sola tipo en Rusio. Jen du aliaj:



4.2. La franca

En la cara Rusio la franca lingvo estis la ŝika “lingua franca” de kortego, nobelaro kaj riĉularo, kiel la angla de la sciencularo kaj komercistaro ekde la fino de Mondmilito 2.

4.3. “Federico Villarreal”

Jen do la nura korekta ortografio. Sufiĉe oftaj eraroj: Federico, Villareal, Villarréal. Ankaŭ Zamenhof skribis en la adreso “Villareal”, ĉar sur la koverto de la sendita verko la presisto malkorekte tiel literumis la familinomon.

4.4. Dr. L. Samenhof


Jam post la apero de la Unua Libro (1887), Zamenhof komencis uzi apud sia persona nomo, aŭ anstataŭ ĝi, la alprenitajn formojn Ljudovik aŭ Ludvigoks. Sekve li venis al la formo L.L. Zamenhof, kies unuaj literoj estis esperantigita formo de Lazaro Ludoviko. Tiun formon li konsekvence uzis en Esperanto ekde 1904.

Lia familinomo estis germandevena, kunmetita per la vortoj “Samen” (= semo) kaj “Hof” (= korto). La origina formo do estis Samenhof, sed Lazaro (< jide Lejzer), komencis ĝin per litero Z, ĉar la komenca S en la germana estas prononcata [z]. Poste, en portugalaj, svedaj kaj ĉefe en germanaj publikaĵoj li uzis ankaŭ Samenhof, por ke la germanoj k.a. prononcu ĝin Zamenhof (la prononco de Zamenhof estus “tsamenhof” en la germana!). Tamen, tiu formo iom post iom malaperis kaj en la germana jam delonge oni skribas nur Zamenhof, prononcante ĝin kiel en Esperanto.

4.5. La dato

Antaŭ la 1^a de marto 1900 la diferenco inter la Juliana Kalendaro (kutima en la rusa imperio) kaj la Gregoria Kalendaro (uzata en la cetera mondo) estis precize 12 tagoj. Post la 1^a de marto 1900 la diferenco iĝis 13 tagojn. Do Zamenhof verkis (aŭ forsendis) la poŝtkarton al Villarreal la 10^{an} de decembro laŭ la Juliana, la 23^{an} de decembro laŭ la Gregoria Kalendaro.

Rimarkinde estas, ke Zamenhof antaŭ 1900 fojfoje eĉ menciis la du datojn samtempe!



13/25 XI (18)95

5. La teksto

5.1. Transskribo

Kara Sinjoro!

*Vian libron "Esperanto
Lengua Internacional" mi
ricevis kaj mi kore vin dankas.
Mi deziras al la libro la
plej bonan sukceson kaj
mi esperas ke ĝi baldaŭ
trabatos por nia afero
larĝan vojon en la Suda
Ameriko.*

Kun kora saluto

Via

Samenhof

5.2. Enhavo

Kiel la "Gotha-letero", ĉi-mesaĝo unuavice estas dankletero. Zamenhof sendis ĝin por danki Federicon pro la ricevo de la libro "Esperanto Lengua Internacional por el Dr. L. Zamenhof. 1902"

En venonta paragrafo, ni emfazos la pli gravan rolon de alia elemento en la teksto por la historio de Esperanto en Sudameriko kaj por la Esperanto-kulturo pli ĝenerale.

6. La adresito


6.1. *Sabio Federico Villarreal (1850-1923)*

La hispana vorto “un/el sabio” estas honora titolo, sed ĉi tie ne atribuita al Federico pro liaj meritoj kiel esperantisto, sed pro liaj sukcesplenaj agado kaj kariero kiel scienculo kaj profesoro ĉe la “Fakultato Scienca” en Limo, la ĉefurbo de Peruo. Sabio do signifas: “Saĝulo”. Li estas ankoraŭ hodiaŭ multe respektata kiel unu el la plej eminentaj homoj en la historio de Peruo kaj de Sudameriko.

6.2. *Federico Villarreal, astronomo, inĝeniero, profesoro ...*

Federico naskiĝis la 30^{an} de aŭgusto 1850 en Túcume (Lambayeque) kaj forpasis en Barranco, la 3^{an} de junio 1923. Liaj gepatroj nomiĝis Ruperto Villarreal kaj Manuela Villarreal.

La loka lernejo bonvenigis lin por akiri la bazan konon. Poste liaj gepatroj sin ege oferis por povi sendi lin al Lambayeque por daŭrigi la edukadon en la mezlernejo, tiam konsiderata kiel promociilo al la instruista profesio. Li fakte instruistiĝis kaj



Federico en 1888, 38 jaraĝa

returnis al la hejma vilaĝo kiel bazlerneja instruisto. Dume kreskis lia intereso por matematiko kaj jam en 1957 li estis dungita kiel instruisto pri matematiko en la Nacia Gimnazio de Lambayeque. Federico, 26-jaraĝa, partoprenis en konkurso organizata de la Konsilio de Lambayeque. Li gajnis altmerite novan postenon, kiu permesis al li en 1877 vojaĝi al la ĉefurbo. En la sama jaro li ricevis la permeson ekstudi en la Universidad Nacional Mayor de San Marcos. Sekve li ekambiciis titolon pri matematiko en la Scienca Fakultato de Limo. En 1881 li finis la studadon en la sama fakultato kaj doktoriĝis kun plej alta distingo. Li estis la unua doktoro pri matematiko en la historio de tiu universitato.

Kiel asistanto kaj poste kiel profesoro, li iĝis eminentulo pri astronomio. Ekde 1884 li ankaŭ instruis mekanikon, grafikan mekanikon, topografion kaj kosmografion.


Kiel scienca publicisto li publikigis preskaŭ 600 artikolojn kaj librojn koncerne diversajn fakojn, kiel matematikon, astronomion, geodetikon, instruadon de matematiko, inĝenieran sciencan, historion, peruan kulturon k.a.

Li do estis sendube unu en la plej gravaj “sabio”-j de Peruo, de Sudameriko kaj eĉ de la tuta mondo.

La famo de Sabio Federico Villarreal estas tiel granda, ke en 1963 en Limo estis fondita la “UNIVERZIDAD NACIONAL FEDERICO VILLARREAL”.

Kroma respektaspekto estis lia postmorta promocio per la titolo “Ŝtatministro”.

Pro peto de la aŭtoritatoj de Túcume, la senvivaj restaĵoj de unu el la plej superbaj homoj iam vivintaj en Peruo estis elterigataj kaj omaĝe reenterigataj la 29^{an} de aŭgusto 1998 en lia devena hejma vilaĝo.





6.3. F. Villarreal, la pursanga Esperanto - pioniro



Al la sesa kajero (volumo) de sia “Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof”, Ludovikito donis kiel titolon la sloganon **“Kun gradaj paŝoj eksterlanden!”** Ĝi pritraktas la korespondaĵojn de Zamenhof en la periodo 1901-1904.

Altirita al Esperanto per artikoloj de Charles Méray (1835-1911, Francio), Villarreal esperantistiĝis en la jaro 1900 kaj preskaŭ tuj (1901) iĝis ege aktiva adepto de la lingvo internacia. Senĉese li penis dissemi Esperanton en la sud-amerika kontinento. Li laboris por Esperanto publikigante multajn artikolojn en “Revista de Ciencias”, kiun li redaktis kaj en “El Comercio”, la plej malnova perua gazeto. En 1903 li fondis “Societon por propagando de Esperanto”. Poste estis aranĝitaj kursoj en la urboj Chiclayo, Arequipa kaj Humachuco. En Huaraz oni aranĝis E-kursojn en 1906 en la societo “Evolución juvenil”.

Daŭrigintoj kaj helpantoj de Villarreal estis en 1905 pastro D. Cerna en Jesus kaj Em. Fetzet, direktoro de la nacia kolegio en Arequipa. En 1906, laŭ la interveno de la deputitoj Núñez del Areo kaj Malaga Santolatta, la parlamento donis subvencion al la E-Societo. Samjare oni komencis instrui Esperanton en la Komerca Lernejo de Limo. La partopreno de Villarreal en la movado por Esperanto ne nur estis grava por la historio de Esperanto en Peruo, sed ankaŭ por la tutmonda movado. Li estis amiko de Zamenhof kaj membro de la komitato por la plibonigo de la lingvo. Villarreal partoprenis la unuan Universalan Kongreson en Boulogne-sur-Mer, Francio, en 1905. Bedaŭrinde, post la morto de tiu pioniro la movado en Peruo apenaŭ ekzistis. Pro la iniciatemo de Janet Skotte kaj Ulpiano Villanueva la movado reaperis en 1955. Poste, pro la interreta tempo aperis jen kaj jen gejunuloj, kiuj lernis la lingvon memstare. La provizora kulmino tamen estis la apero de gazetartikolo en la fama revuo “El Comercio”. Post tiu artikolo relative multaj peruanoj komencis studi la lingvon. En 1901, en Limo estis eldonita hispanlingva verko de Federico, traduko de la Unua Libro, sub la titolo: *“Manual para aprender la lengua internacional Esperanto, inventado por el médico ruso, Dr. L. Zamenhof; contiene la pronunciación, gramática y doble vocabulario para el uso de los españoles.”* Traducido por Federico Villarreal. Lima, Imp. de la Escuela de Ingenieros, J. Messitias, AÑO 1901, Primera EDICIÓN.



Unu jaron poste sekvis la verko *“Esperanto. Lengua internacional por el Dr. L. Zamenhof. 1902”*. Ĉi-verkon li sendis al Zamenhof en Varsovio kaj decembre de la sama jaro Zamenhof respondis per la poŝtkarto kiu estas **la temo de ĉi-monografio**. Tre grava jaro por la dissemado en Sudameriko estis la jaro 1903. Se oni flanke lasas la folieton EIE, aperinta ununumere en Valparaiso (Ĉilio) en majo 1901, la revuo *“Antaŭen Esperantistoj!”* estis la unua Esperanto-gazeto en Sudameriko, kiu dum 13 jaroj (1903-1916) aperis dank’al Federico, kiu organizis kaj finance subtenis la organon ĝis la dato de sia forpaso.

Tiu revuo aperis kaj en Esperanto kaj en la hispana. Tial ĝi estis heroldata kiel “*Monata gazeto, organo de la Perua Esperantista Societo / Periódica mensual, órgano de la Sociedad Esperantista Peruana*”.

Ĝi enhavis propagandon, en- kaj eksterlandan kronikojn, bibliografion, literaturon, lingvajn demandojn, k.a. Villarreal en ĝi ankaŭ publikigis siajn sciencajn artikolojn kaj mem finance subtenis la perpoŝtan dissendadon eksterlanden. Bonŝance, aliaj “sabio”-matematikistoj kaj -astronomoj eksterlandaj, kiel li, estis esperantistoj! Kiel montras la subtitolo de la revuo, en la sama jaro Villarreal ankaŭ fondis la unuan sudamerikan E-asociacion “Sociedad Esperantista Peruana”.

II K o m e n t a d o

Kiel la Gotha-letero (1909), ankaŭ la Lima-letero (1902) ne apartenas al la t.n. “famaj” leteroj, kiel tiuj al Borovko kaj al Michaux, en kiuj oni trovas ĉiujn necesajn informojn por kompreni kiel naskiĝis la internacia lingvo kaj kiel ĝi sanĝis la vivon de la iniciatinto de Esperanto.

Tamen, ĝi ne estas banala letereto, kiel tiu en kiu Ludoviko, tamen konata kiel sufiĉe timida afablulo, devis insiste postuli de iu pastro A.F. Runstedt en Upsalo (Svedio) ŝulditan sumon, ĉar tiu pastro “forĝesis” pagi al Zamenhof “24.15 kop por la 21^{1/2} folioj de la Biblioteko”.

Kiel Zamenhof en la posta Gotha-letero instigos D-ron Carl Rohrbach refondi la germanan esperantan movadon, tiel li kuraĝigis en 1902 D-ron Federico Villarreal : “... ke ĝi (la al li sendita verko) baldaŭ trabatos por nia afero larĝan vojon en la Suda Ameriko”. Ambaŭ leteroj do estas po unu el tiuj sufiĉe oftaj komunikiloj “*per kiuj li konstante gvidis la unuajn paŝojn de la frutempaj pioniroj*” (André Ribot).

Kiugrade Villarreal sukcesis dissemi la Esperanto-movadon en Sudameriko provizore ne estas tute klare, pro manko de fontoj.

Tamen bonŝance mi malkovris ege interesan artikolon en numero 2 de la anglalingva “BULLETIN of the international bureau of the AMERICAN REPUBLICS”, VOL XXX de februaro 1910, pp. 268 – 269.

Jen kelkaj fragmentoj, elangligitaj el artikolo titolata “Esperanto in Pan-America” (Esperanto en Tutameriko):

Pro la aktuala strebado por disvastigi Esperanton kaj uzi ĝin por plibonigi la komercajn rilatojn inter diversaj landoj, ĉefe tiuj de Norda kaj Suda Ameriko, la BULLETIN publikigas la jenan koncizan mesaĝon far S-ro JAMES W. CHENEY, BIBLIOTIKISTO de la Milita Departemento. Laŭ li la usona konsulo en Chemnitz, Saksujo, diris:

“La graveco de Esperanto kiel faktoro de plisimpligo kaj plifaciligo de la internacia komerco estas klara kaj la nombro de oficistoj sukcesantaj senpene uzi ĝin, rapide kreskadas (...).

La Tutamerika Scienca Kongreso en Santiago de Ĉilio en januaro 1909 deklaris sian aprobon de Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo kun speciala valoro por Ameriko, la estonta kampo de agado de la du grandaj civilizacioj (hispana- kaj anglalingvaj), kiuj reciproke, kaj komerce kaj politike, kunagados.

Laŭ la perua Esperanto-revuo “Antaŭen Esperantistoj!”, propagando por Esperanto estas disvastigata en ĉiuj Sudamerikaj Ŝtatoj. La brazila registaro oficiale agnoskis la novan internacian lingvon per la decido publikigi la raporton de la Nacia Ekspozicio de 1908 en tri lingvoj: la portugala, la franca kaj Esperanto.

La revuo “British Esperantist” de aŭgusto 1909, referencante al la trilingva raporto, diras: ‘La nura enkonduko, lerte verkita en Esperanto, estas ege interesa 50-paĝa pamfleto, kiu enhavas multajn valorajn informojn, koncerne la komercajn helprimedojn kaj la socian evoluon en la Respubliko.’



Estas menciinde, ke S-ro MARQUES DE OLIVEIRA, kiu speciale tiuokaze sin dediĉis al Esperanto, verkis la raporton post lernado de la lingvo dum nur kelkaj monatoj. Rilate al la aktuala potenco kaj rapida evoluo de tiu lingvo, la progreso al kiu estos aldonata antaŭenpuŝa energio okaze de la “Sesa Ĉiujara Kongreso de Esperantistoj”, kiu okazos en aŭgusto en Vaŝingtono, la praktikaj avantaĝoj de Esperanto por komercaj rilatoj estos baldaŭ fundamente aprobataj de la plej progresemaj entreprenoj de la okcidenta mondo.”

III Postparolo

1. Sekvaj paŝoj

Tiu ĉi monografio probable iom kontribuetas al la celo de la laŭdinda Ludovikito por kompili plejeble kompletan verkaron de Zamenhof.

Ĝia apero instigu aliajn gesamideanojn ĉiam atente observi la proponojn en la kampo de (ciferataj) aŭkcioj kaj, se eble, konservi leterojn per propra aĉeto.

Krome, mi persone dezirus, ke esperantistoj kiuj posedas originalan leteron de Zamenhof, analizu ĝin kaj sciigu la rezultojn per eldono en sufiĉe fama revuo, por ke la trezoroj de nia kulturo ne dormadu en tirkesto aŭ monŝranko. *Ĉeestante dum aŭkcio okaze de la jubilea UK en Lilo (Francio), mi konstatis, ke komuna dankletero de Ludoviko kaj Klara, de ambaŭ manskribita, estis vendita je pli ol 1000 eŭroj. Bedaŭrinde, ekde tiam mi ne plu aŭdis ion pri ĝi!*

La priskribita Lima-letero ankaŭ ebligas denove prilumi aspekton de nia historio apenaŭ konata en la okcidento kaj ankaŭ eble en granda parto de Sudameriko mem.

Tial mi certe atentigos niajn peruajn samideanojn pri ĝia ekzisto kaj pri la monografio, por ke ili mem, kiuj nur devas kapti la lokajn fontojn, kompletigu tiun ege gravan kaj interesan aspekton de la esperanta kulturo.

2. Dankvortoj

Ĉi tiun verkon mi danke kaj tutkore dediĉas al mia edzino, Vivienne Tufts, ekde 1992 ankaŭ mia samideanino, kiu denove helpis min per esplorado, tajpado kaj paĝaranĝo.

Mi evidente dankas ĉiujn kiuj iel kontribuis al la verkado kaj al la publikado.

Mi dankas Mag. Bernard Tuidar, la teamestron de la Kolekto pri Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo en Vieno, pro la sendado de gravaj informoj.

Krome, S-ron Peter Reynaers, kiu prizorgis la tradukon de hispanlingvaj artikoloj.

Laste, sed ne balaste, mian samideanon kaj amikon Marc Vanden Bempt, kiu, kiel kutime, akurate provlegis kaj sendis informojn.

Mi evidente ne forgesu tutkore danki S-rinon Perla Martinelli, kiu kune kun la redaktaro decidis publikigi ankaŭ ĉi tiun monografion en “Literaturo Foiro”.

IV Bibliografio

- *Enciklopedio de Esperanto*, Volumo II, K-Z p. 562, Literatura Mondo, Budapeŝto, 1933
- André Ribot: *Aŭtografaj de D-ro L.L. Zamenhof*, Kolekto “Zamenhof en sia tempo”, 1965
- Johann Dietterle: *Originala Verkaro de L.L. Zamenhof*, F. Hirt, Leipzig, 1927
- Adolf Holzhaus: *Zamenhof; leteroj*, Helsinko, Fondumo Esperanto, 1975
- Ludovikito (Itô Kanzi): *Kun gradaj paŝoj eksterlanden!* Originalaro 6, Eldonejo Ludovikito, Kioto, 1979
- Ludovikito: *Aŭtografaj de Ludoviko*; Kromkajero IV, Eldonejo Ludovikito, Kioto, 1989
- Ludovikito: *Spikumajoj I, II, III*, Ludovikologia Dokumentaro XVI, XVII, XVIII, Eldonejo Ludovikito, Kioto, 1994, 1995, 2004
- Jenny Castro Peña: *VILLARREAL, Federico*, Lexus Editores, ed. Grandes Forjadores del Peru (1^a edición), Lima: Lexus, pp. 430-431
- Alberto Tauro del Pino: *VILLARREAL Federico*, Enciklopedia Ilustrada del Peru 17 (2001, 3^a edición). Lima. PEISA, pp. 2756-2756
- David Carbajal: *Polinomio de Villarreal*, ResearchGate. Consultado el 20.11.18, 2016
- Anthony Watanabe: *Federico Villarreal, Matemático e Ingeniero*, Lima, 2008
- *BULLETIN of the international bureau of the AMERICAN REPUBLICS*, VOL XXX, number 2, pp. 268-269, feb. 1910